



Informoj:  
Arto :- Literaturo  
Turismo :- Scilgoj

# NIA VIVO

Administracio  
kaj Redakcio:  
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

## «Frateco» dum la 1.931<sup>a</sup> jaro

En la pasinta januaro okazis la ordinara ĝenerala kunsido de nia Societo. Nia Sekretario legis al la ĉeestantaro la jaran «raporton» per kiu niaj fratecanoj sciis pri nia stato kaj la laboroj faritaj dum la finita jaro. Unue li dediĉis bedaŭran rememoron al la mortintaj samideanoj S-roj Floría, Isábal kaj Vicente.

Ankaŭ oni komunikis al la fratecanoj ke pro la suface bona stato de nia kaso, la Direktanta Komitato invitis al tiuj membroj, kiuj volonte plialtigis sian kotizon, malplialtigu ĝin kaj donis al ili plej sinceran dankon pro ilia monhelpo dum malfacilaj tempoj.

Estis elmontrata la granda sukceso de la publikigado de NIA Vivo, tio kio okazigis pli ol 50 novajn membrojn de ekster Zaragoza kaj multajn gratulojn pro tia inda esperanta laboro. Oni decidis kiel rememoro pri nia estinta samideano S-ro Floría, kiu faris la unuajn laborojn por la publikigado, ke lia nomo aperu en la bulteno, kiel iniciatinto. Ankaŭ oni decidis ke S-ro Bruquetas estu la Direktoro. Ankaŭ oni voĉdonis dankojn por S-ro Inglada pro lia grava esperanta helpo kaj por S-ro Martínez por lia estiminda laboro en NIA Vivo.

Oni dankis la profesorojn S-rojn Artigas, Salas, Etayo, Til, F-inojn Casanovas kaj Salvo pro iliaj klarigadoj. Oni ankaŭ rimarkigas la interesajn laborojn faritajn per la korespondaj kursoroj gvidataj de S-ro Orós, kio ebligis starigi grupetojn en kelkaj vilaĝoj de nia regiono. Oni atentigis pri la verkoj aĉetitaj por nia Biblioteko. Ankaŭ pri la sukceso de la monkollekto por la familio de nia mortinta samideano S-ro Floría. Oni atentis la fakton pri tio, ke kvankam nuntempe la politikaj publikaj priokupoj baras pensi pri idealismoj, kiel Esperanto, kaj spite de la gravaj elspezoj, kiujn supozas la publikigado de nia bulteno, la kaso de Frateco antaŭeniras kiel oni povas vidi per tiu resumo: Bilanco en 31-12-1930: 2.081,55 ptjn; enspezoj dum 1931: 3.431,60; elspezoj: 2.797,37; Ekzisto en 31-12-1931: 2.715,78 ptjn.

Poste, la nova Regularo estis diskutita kaj aprobita, kaj fine oni elektis la membrojn por la Direktanta Komitato, kiu por la nuna jaro estas:

Prezidanto, S-ro J. Orós; Vicprezidanto, S. R. de Salas; Sekretario, S. F. Etayo; Vicsekretario, S. J. Puértolas; Kasisto, S. J. Larruga; Vickasisto, S. P. Abad; Kalkulisto, S. F. Turrión; Vickalkulisto, S. J. M.<sup>a</sup> Uñez; Voĉdonantoj: 1.<sup>a</sup>, F-ino M. Casanovas; 2.<sup>a</sup>, S. R. Gastón; 3.<sup>a</sup>, S. F. Artigas; 4.<sup>a</sup>, S. M. Maynar.

## PRI LA ASONANCAJ RIMOJ

Laŭ la difino donita de D-ro Zamenhof mem: «la esperanta versfarado konsistas el la regula alternado de silaboj akcentitaj kaj ne akcentitaj».

Tiu ĉi ĝusta kaj fleksebla difino liveras tiajn grandampliksajn limojn, ke ĉiuj naciaj versofaradoj estas imititaj jam de Esperanto kun granda sukceso, kiel pruvas la multenombra trezoro da poeziaj verkoj esperante tradukitaj.

Ĉar la hispana lingvo, per sia strukturo kaj elparolado, plej similas al la esperanta, ŝajnas al mi, ke estas tre interese, ke la hispanaj esperantistoj pliriĉigu la esperantan versverkaron tradukante la plej rimarkindajn hispanajn poemojn kaj imitante nian nacian versofaradon.

Du gravaj baroj malfaciligas la taskon. Unue la prozodia rigida regulo, kiu trudas ke, en Esperanto ĉiu vokalo formu apartan silabon; ĝi estas por ni grava malfacilaĵo, ĉar ni estas kutimintaj kunigi en sama silabo kelkajn apudajn vokalojn apartenantajn al sama aŭ al malsama vorto. Tio ĉi devigas nian aŭdadon halti momente ĉe ĉiu aparta vokalo por sukcesi, ke du apudstaraj vokaloj sonu laŭ malsamaj silaboj. Por eviti tian renkontiĝon, de vokaloj kiu ofte ne plaĉas al hispanoj, oni penas, kiel eble, ne apudmeti vortojn, kies komenco aŭ fino estas vokaloj. Por tio oni povas ŝanĝi la ordon de la vortoj en la frazo, profitante la mirindan liberecon de Esperanto en la vortaranĝo, aŭ intermeti vorteton (articolon, kc) aŭ ankaŭ forigi la finan vokalon de la substantivo kaj artikolo.

La dua barilo estas la malfacileco trovi bonajn konsonantajn rimojn, ĉar la diverseco de la vort-

finiĝoj ne estas tiel riĉa, kiel en hispana lingvo. Tiun malfacilaĵon oni povas eviti skribante senrimajn versojn, kiel faris, niaj plej bonaj verkistoj kaj nia Majstro mem verkante, ekzemple, la belegan tradukon de Hamleto. Ekzistas alia meza solvo, kiu konsistas en tio: uzadi la asonancajn rimojn, tiel bele kaj ofte trovatajn en la hispanoj versaĵoj.

Jam en la jaro 1906<sup>a</sup> mi presigis en la unua numero de *La Revuo* originalan versaĵon, titolitan: «Mia poemo» kun asonancaj rimoj, laŭ la hispana sistemo. Post la versaĵo mi aldonis la jenan klarigan noteton: «En tiu ĉi versaĵo (vidu la duan kaj kvaran verson de ĉiu strofo) oni uzas neplenan rimon, nomitan en hispana lingvo *asonanca*. Du vortoj rimas asonance, kiam en finiĝo ili havas la samajn vokalojn komencante de la akcentita. Ekzemple: «disŝiro», «amatino», «fantazio», kiuj estas asonancaj, ĉar ili finiĝas per samaj vokaloj *i-o*. Tiu duonrimo, kiu ne atentigas konsonantojn, estas tre ŝatata en hispana lingvo, eble la sola eŭropa lingvo, kiu ĝin posedas».

Mia provo uzi la asonancajn rimojn elvekis grandan intereson, ĉar multaj Esperantistoj skribis al mi pri tio, kaj eĉ kelkaj sendis al mi tradukon el francaj versaĵoj laŭ tiu sistemo.

Sed mia provo ne trovis, miaopinie, tian grandan disvastiĝon, kiel mi dezirus por la gloro de la hispana poezio. Tial post 25 jaroj, mi revenas al la sama demando, profitante la gastamecon de la bela kaj entuziasma monata bulteno NIA VIVO, de la esperanta Societo «Frateco», por plivigliĝi la propagandon de la asonancaj rimoj, esperante ke niaj inspiremaj poetoj verkos aŭ tradukos novajn poemojn laŭ asonancaj rimoj.

Kiel provon de vigleco kaj efikeco de tiu duonrimo, mi prezentas du ekzemplojn: unu mallongan, tio estas, la ĉarman versaĵeton de nia malnova samideano S-ro J. Morató, kiu verkis «Etaĵo» en la jaro 1909<sup>a</sup>. La alia, pli longa, estas traduko de la komenco de la fama verko de nia gloraŭtoro Tirso de Molina nomita: «La Sevilia de logisto kaj ŝtona gasto», kie aperas majstre pentrita tiu ĉiekonata amindumisto nomita Don Juan. Tiu ĉi peco estas sufiĉe longa en la celo, ke niaj legantoj prijuĝu, ĉu la esperanta traduko konservas aŭ ne la ĉarmon de niaj «romances», tiel uzataj en nia poezio kaj speciale en la teatro verkoj.

V. INGLADA.

## GRAVA

Ĉiu Fratecano al kiu plaĉus partopreni la XXIV.<sup>an</sup>, Universalan Kongreson de Esperanto okazontan en Parizo ĉe la nunjara monato aŭgusto, bonvolu veni vespere en la sekretariejon de nia societo, kie oni sciigos lin pri interesa afero tion rilatanta.

## ETAĴO

Al birdo simila  
Lasanta la neston,  
De unu el ŝiaj okuloj defluis  
Scivola larmeto.

En la okulharo  
Ĝi kuŝis momenton,  
Sendube ĝi serĉis la vojon plej ĉarman  
Por sia promeno.

Jen ĝi sur la vango,  
Kun kia ĝojeco  
Ĝi rulas rapide celante de l' buŝo  
La ravan mielon!

Sed kiam ĝi preskaŭ  
Ektrafas la celon,  
Subit-enamiĝis pri ĝi sunradio  
Kaj ĝin vaporigis per fajra kareso!

J. MORATÓ.

## POR LA FAMILIO DE S-RO FLORÍA

Livro de la monokolekto

Ni ricevis pere de «Hispana Esperanto Asocio» por la familio de nia malfeliĉa estinta kunsocietano S-ro Izidoro Floría, sepdek pesetojn, kiujn tiu Societo kolektis, laŭ la alvoko publikigita en «Hispana Esperanto Gazeto». Ni multe dankas al «H. E. A.» ĝian helpon kaj petegas ke ĝi, je nia nomo, prezentu al la donintoj nian dankesprimon.

Post la ricevo de 70 pesetoj, senditaj de Hispana Esperanta Asocio por la familio de S-ro Floría, restis fermata la monokolekto iniciatita de Frateco, kies sumo estis 745'75 pesetoj. Samtempe, ankaŭ la Urbeŝtaro kaj Asocio de Komerciaj Agantoj fermis la monokolektojn samcele de ili iniciatitajn, liverante al vidvino de nia malfeliĉa samideano la respektivajn kvantojn, po duono por ŝi kaj por ŝiaj du filetoj profite de kiuj oni ĝin enspezis en ŝpara banko. «Frateco» delegis tri komitatanojn kiuj vizitis S-ino. Floría por liveri al ŝi la kolektitan kvanton, kiu estis disdonata duone laŭ dirita formo.

Pli ol kiom ni povus diri pri la dankemo ĉe S-ino. Floría, esprimas la sekvonta letero ricevita el ŝi, kiun ni tradukas, precipe, ĉar ĝi montras al ni kiel fruktodonas la esperanta semo.

\* \* \*

Zaragoza, 4 de Enero 1932

S-ro Prezidanto de Esperanta Grupo «Frateco».  
Altestimata Sinjoro:

De tri komitatoj delegitaj el tiu Asocio, mi estas ricevinta la kvanton da pesetoj: 745'75, rezultato el la monokolekto iniciatita de vi kaj efektivigata inter la esperantistaro por min helpi pro la

grava ekonomiksituacio kiun la fataleco kreis ĉe mi je la tragediŝa morto de mia malfeliĉa edzo.

Mi petegis por ke estu publikigata per ĵurnaloj mia danko; sed la memoro de mia edzo, tiel kunligata al la esperanta ideo, kiun li sentis kun tiel granda entuziasmo, devigas min skribi al vi ĉi-tiujn liniojn, kiuj pale reflektas mian dankemon.

Dankojn, koregajn dankojn al la esperantistaro pro la sincera estimo montrita al mia edzo kaj pro la sento je mia malfeliĉo. Mi nepre kondukos miajn filetojn en la noblan ideon de paco kaj frateco «Esperanto», honorante la memoron de ilia patro.

Tre kore salutas vin, *Sabina Blasco*, Vividno de Floriá.

### La unua pagata Katedro de Esperanto en Hispanujo

Danke al la klopodoj de nia samideano S-ro Andrés Piñó, la Universitato de Valencio starigis katedron de Esperanto en la Instituto de lingvoj de tiu Universitato, kaj estis nomita profesoro S-ro Manuel Caplliure rekompetita per 150 p-tjn monate. Tiel oni parolas!! Niajn korajn gratulojn al la unua hispana Universitato, kiu praktike atentis pri nia idealo, kaj al la viglaj pioniroj s-roj Piñó kaj Caplliure.

## ESPERO

Neĝas; senbrue\* neĝadas. Ĉielo griza; blanka, senmakula tero.

Malgaje silentas Naturo.

Neĝas, neĝadas.

Ni marŝas antaŭen ĉiam kaj ĉiam, lasante per niaj paŝoj kavajn postsignojn sur la senmakula tapiŝo, kiel rozario senfina, kiel spina branĉo de grizpala rozujo.

La vojo estas senlima: longa, tre longa; larĝa, tre larĝa. Ni mem ĝin desegnas laŭ nia pena marŝado.

Post kelkaj horoj, kiam la neĝo kovros denove niajn postsignojn, kiu povos nin sekvi? Kiu scios pri ni? Kia restaĵo aperos de nia laboro?

Ni marŝas antaŭen ĉiam kaj ĉiam.

Neĝas, neĝadas.

—Niaj korpoj kiel glacio estas ja malvarmaj, sed ankoraŭ bruletas animoj.

—.....

—Jen... kio estas? Birdeto, mortajo.

—.....

—Jes; tie flugetas alia. Ĝi baldaŭ mortos pro malvarmo; sed ĝi amas ankoraŭ sian kunulon. Ni prenu.

—.....

—Jes; ambaŭ. Varmigu tiajn korpojn apud viaj

animoj. Vivigu ilin, ĉar estas signoj de nia espero. Kiel nia espero, ili ne mortos.

—.....

—Marŝu, marŝu antaŭen, ĉiam antaŭen. Laciĝo, kio estas? Ĉu niaj idealoj ne estas pli fortaj ol la birdaj korpoj, ĉu ne estas pli valoraj? Kial mortigi ilin? Esperu, ĉiam marŝante esperu... Baldaŭ suno brilos.

—.....

—Pena laboro, jes, sed ni harditaj.

—.....

—Ni venkos...? Certe, ĉar malvarmo ne venkas nin.

Forte, konstante, senĉese nia rondo kunbatalas kontraŭ neĝo, malvarmo, glacio en homaj korpoj. Sankta nia idealo, bezonas longedaŭrajn niajn penojn. Sed ni venkos, ĉar nia espero estas forta, pli forta ol niaj brakoj, pli forta ol niaj brustoj.

Ni marŝas antaŭen ĉiam kaj ĉiam.

Sur nia vojo, neĝo; fajro ĉe koro.

RODRIGO GÁLLEGO.

### La kino, patrino, estas ia afero!...

La aĵoj, kiujn ni lernis kaj oni lernigis al ni, kiel nedetruiblaj principoj, dum la infaneco, restas en ni tiel profunde, ke poste, kvankam ni vidos la eraron, ni jam ne povos eljeti ilin el ni; ili jam formas parton de nia estaĵo, kaj estas tre malfacila ilia eltiro.

Tio okazas al mi kun la diraĵo: «La leono estas la reĝo de la bestaro», kaj mi diras tion, ĝuste, pri tio, kion ni vidas tiujn ĉi tagojn en la filmoj pli aŭ malpli sonaj. Oni lernigis al ni, ke la leono vivas kaj agadas majeste en arbaregoj kaj ni vidis en la filmoj, ke ĝi ne funkciadas ĉe sia regno, sed ĉe semitajteroj kaj kampoj kiel tiuj, kiuj ĉirkaŭas iun ajn malgrandan vilaĝeton kaj, kiel agadas la plej malnobla rabisto: ĉe senhoma kampo kaj en anaro, eĉ ĝi ne nur ĉasadas bongustajn pecetojn, kiel la cervon, gazelon, ktp; sed ĝi ĉasadas ankaŭ tiom, kiom atingas ĝiaj ungegoj, ne rememorante sian reĝan kondiĉon.

Mi ankaŭ kredis, ke ĝi estas la plej forta el la sovaĝaj bestoj, kaj mi vidis en kinejo, kun granda elreviĝo, ke humila zebro traktis ĝin, «per ŝubatoj» kaj, ke ne respektante la reĝan naturon de la atakanto, ĝi regalis al la leono per fieraj huffrapoj, kaj mi vidis kiel la leono decidis vulgare kaj demokrate, forlasi sian konjektitan kaptajon.

Kaj, fine, mi vidis, kun granda miro, ke eĉ la homo kondukis kun ĝi, kiel kun iu ajn ŝtelanta hundo; mi vidis kiel 3 homoj per lignaj stangoj frontis kontraŭ ĝi, kriegis al ĝi, kaj kiel la brava leono foriris kien ĝi venis, ne kuraĝante eĉ mal multe blekegi por timigi ilin. Mi vidis pli, mi vidis

leonon defendi ĝian kaptajon kontraŭ aliaj, kaj en sovaĝa kaj emocia batalado mortigi kolegon, grandan, fortan kaj ŝajne kuraĝegan, poste, kiam ĝi foriris trenante sian akiraĵon, por trankvile gustumi ĝin, bari al ĝi la vojon la 3 homoj, kiuj kuraĝis disparti al ĝi la kaptajon, kaj la leono, ne tiel terura kiel oni priskribas ĝin, forlasi al tiuj homoj la akiraĵon kiun antaŭ ne multe ĝi defendis brave kontraŭ siaj similuloj.

Tio klarigis al mi la ĝis nun, por mi ne klarigeblan heroaĵon de D. Kihoto kontraŭ la leonoj; Cervantes diras traktante pri tiu aventuro: «sed la malavara leono, pli modera ol aroganta, ne ŝatante la infanaĵojn nek la fanfaronajojn, post la rigardado de unu al alia loko, turnigis la dorson kaj montris la postvangojn al D. Kihoto...», kaj tiel skribas Cervantes influita kiel mi de lernigadoj pri la braveco kaj nobleco de l'leono, sed la kino klarigis al mi la veran kaŭzon pri tia sintenado, ŝajne bela, de la sovaĝa besto antaŭ ĝia nobla kontraŭulo; se antaŭ homoj ekipitaj per lignaj vergoj la leono forkuris pro timo, pro timo ĝi rifuzis la batalon al kiu D. Kihoto, kuraĝulo, incitis ĝin; la timo estis tio, kio faris al ĝi montri la postajon kaj kaŝi, per tia agado, per mieno ŝajne de malestimo, tio, kio, estis timo antaŭ homo, kiu, krom kuraĝa estis armita per glavo, lanco kaj ŝildo.

Tioma estis la elreviĝo, ke la vera kondiĉo kaj malmulta majesteco de la leono kaŭzis al mi, ke hodiaŭ mi sentas min preta, per sufiĉe da kuraĝo, por fari heroaĵon, kiu malgrandigus tiun de Tartarin de Tarascon, kiam li armita per ĉiaj armiloj iris por fortikiĝi la animon antaŭ la kaĝo de leonoj; mi kuraĝus prezenti min, malekipata per ĉiaj armiloj kaj batalinciti, kuraĝa kaj fiera, la plej timandan leonon, kiun mi trovos post la dikaj feroj de l'kaĝo (ju pli dikaj, des pli bone). Tiel estas la elreviĝo, kiun kaŭzis al mi vidi en kinejo, kiel agadis la reĝo de la bestaro.

La kino, patrino, estas ia afero!...

E. BRUQUETAS.

## RONDO FRATECO LA UNUA

La artikolo, kiun ni publikigis en nia antaŭa numero de NIA VIVO tuj fruktodonis. Jam ekomencis labori la UNUA kies partoprenantoj estas: S-roj 1, Inglada; 2, San Antonio; 3, Alvarez; 4, Lozano; 5, Marauri, de Madrido; 6, Maynar; 7, Bruquetas; 8, Artigas; 9, Uñez; 10, Larruga; 11, F-ino Salvo kaj; 12, F-ino Casasnovas, ĉi tiuj de Zaragoza.

Estras S-ro Vicente Inglada. Ni preparas la starigon de la DUA tial ke ni jam ricevis kelkajn petojn por ĝi. Ĉiu kiu volos partopreni en tiu esperanta perfektigado povas sin turni al ni kaj ni sendos al li la Regularon kaj foliojn.

## SCIIGOJ

Nia kunsocietano S-ro Antonio Agustín Fernandez, de Durcal (Granada), ĵus edziĝis. Ankaŭ eniris en nova edziĝa stato nia samideanino Matilde Gil de Arándiga. Al la du novaj paroj ni deziregas feliĉan kaj longan vivadon.

\*\*\*

Por helpi la publikigado de NIA VIVO sendis al ni S-ro Rubio, de Madrid, 3 ptjn; S-ro Paul Tarnow, de Düsseldorf (Germanujo), 2,50 ptjn; S-ro Fernando Redondo, de Palma de Mallorca, 2 ptjn; S-ro Bescós, 3 ptjn.

Al ĉiuj niajn dankojn.

## SPRITAĴOJ

—Kial vi faras dormi la infanon sur tiel alta lito?

—Ĉar tiel mi aŭdos se li falos sur la plankon.

\*\*\*

—Karolino diris al mi, ke vi diris al ŝi tiun sekreton, kiun mi diris al vi, kaj pri kiu mi diris, ke vi diru ĝin al neniŭ.

—Ho, ŝi, la sentaŭgulino! Kiam mi diris al ŝi la sekreton, mi diris al ŝi, ke vi diris al mi, ke mi al neniŭ diru ĝin; kaj mi diris al ŝi ankaŭ, ke ŝi ne diru al vi, ke mi diris ĝin al ŝi.

—Bone, mi pardonos. Mi diros al ŝi, ke mi ne diris al vi, ke ŝi diris al mi, ke vi diris la sekreton al ŝi; do, ne diru al ŝi, ke mi diris al vi, ke ŝi diris al mi, ke vi diris ĝin al ŝi.

\*\*\*

—Karega amiko, vi ne estas, kiel via patro. Li ĉiam vestis tre elegante.

—Ke mi ne estas tiel eleganta, kiel mia patro?, do, mi kunportas lian saman redingoton.

\*\*\*

—La malsanulo:—Sinjoro kuracisto, mi trinkis erare venenon anstataŭ brandon... Kion fari?

—La kuracisto:—Testamenton.

## AMUZAJO

. O . .  
. O . .  
. O . .  
. O . .  
. O . .

- 1.—Malsano de la haŭto.
- 2.—Loko en konstruaĵo.
- 3.—Parto de la ŝipo.
- 4.—En la homa korpo.
- 5.—Insekto.

MAYNAR.